
# BONA ESPERO



Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj de la "Subtenanta Asocio de Bona Espero"

n-ro 10 januaro 1984

Ktoj de BE: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60
Kto.-Nr 900 826 Bona Espero
Postscheckamt Dortmund: 2033-99-465

Nekutime rapide pasis 1983! Tio kompreneble ne estas objektiva, sed al ni estas tute freŝa la memoro pri vizito de Ursula Grattapaglia en JANUARO. Dum FEBRUARO/MARTO ni ricevis ampleksajn raportojn de Guiseppe Gratt. pri ĉiutagaj eventoj en BE, kiel: fajro en la savano, balotoj, 25jara jubileo, 5 tagoj sen akvo, ktp. Pri tio ni povis koncize informi per cirkulero 7 en APRILO. Germ. kongreso en Säckingen, fine de MAJO, donis okazon konatigi nian societon al la kongresanoj. Per la malnova slogano: Por la prospero de BE, ni vendis ĉarmajn hungarajn manlaborojn, kiujn amiko de BE sendadas por tiu celo. Fervojistoj kaj ties familianoj trovis novaĵojn kaj hungaraĵojn dum JUNIO en Oostende, okaze de la IFEF-kongreso. En JULIO ni invitis per cirk. 8 al la jarĉef-kunveno kun novelektoj. Ĝi estis en AÜGUSTO. La kunveno senŝarĝigis la estraron kaj ĉiuj funkciuloj estis reelektataj ofici por denove du jaroj. Antaü 25 jaroj en SEPTEMBRO geedziĝis bonaj amikoj de BE kaj multaj gastoj festis tion kun ili. Simpla korbeto staris sur la tablo por akcepti la donacojn. Por la prospero de BE ni trovis poste 1500,- sur nia konto. Dum OKTOBRO ni pakis. Kutime la transporto de paketo daüras 2 mon. kaj ili ja alvenu antaü kristnasko. Ne estas malfacile feliĉigi 6 - 12jarulojn per malgrandaj kaj malpezaj donacoj. En BE oni krome ĉiam bezonas infanvestojn kaj ne tro dikajn vestaĵojn por plenkreskuloj. Sed ne sendu pli ol unu paketon monate, por eviti malfacilaĵojn kun la brazilaj doganistoj. En NOVEMBRO raportis Victor Sadler, nova bonesperano, pri ĉiutagaĵoj en BE kaj en DECEMBRO salutis Ursula Gr. ĉiujn amikojn letere. Tiujn salutojn ni hodiaü transdonas al vi kun nia danko pro via fidela subteno de tiu esperanta oazo "BONA ESPERO"

Ungewöhnlich schnell verging 1983! Das ist selbstverständlich nicht objektiv, aber der Besuch von Ursula Gr. im JANUAR ist noch ganz frisch in unserer Erinnerung. Im FEBRUAR/MÄRZ schickte G. Grattapaglia Berichte über Alltäglichkeiten in BE, wie: Feuer in der Savanne, Wahlen, das 25jährige Jubiläum, 5 Tage ohne Wasser, usw. Daraus informierte ausführlich Rundbrief 7 im APRIL. Der deutsche Esperanto-Kongreß, Ende MAI in Säckingen, gab Gelegenheit, unseren Verein bekannt zu machen. Gleichzeitig konnten wir hübsche Handarbeiten verkaufen, die ein ungarischer Freund von BE dauernd für diesen Zweck schickt. Auch beim Int. Eisenbahner-Esp.-Kongreß in JUNI in Oostende gab es Informationen über BE und ung. Handarbeiten zu kaufen. Im JULI konnten wir mit dem Rundbrief 8 zu unserer Jahreshauptversammlung mit Neuwahlen einladen. Das geschah dann im AUGUST. Die Versammlung entlastete den Vorstand. Alle Vorstandsmitglieder wurden für die nächsten 2 Jahre wiedergewählt. Im SEPTEMBER vor 25 Jahren heirateten gute Freunde von BE. Viele Gäste feierten das mit ihnen. Für Geschenke stand ein einfaches Körbchen auf dem Tisch. Für die Unterstützung von BE fanden sich wenig später 1500,-DM auf unserem Konto. Im OKTOBER haben wir gepackt, weil Pakete gewöhnlich 2 Mon. unterwegs sind und sie vor Weihnachten ankommen sollten. Es ist ja nicht schwierig für 6-12jährige Kinder kleine, leichte Geschenke zu finden. In BE braucht man auch immer Kinderkleidung und nicht zu dicke Kleidung für Erwachsene. Aber man sollte nicht mehr als 1 Paket im Monat schicken, damit der brasilianische Zoll keine Schwierigkeiten macht. Im NOVEMBER berichtete Victor Sadler über den Alltag in BE und im DEZEMBER, zum Jahresausklang, sandte Ursula Gr. Grüße an alle Freunde. Diese Grüße geben wir heute weiter, mit unserem Dank für Ihre treue Unterstützung.

Resp. Margret Brandenburg,
Brinker Damm 24, D-4404 Telgte